Universala Esperanto-Asocio



KVAR EVENTOJ KAJ LERNILO

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2016-25 sendita el Budapeŝto, la 10an de septembro.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

# Universitata Kolokvo en Timişoara

Rumanio gastigos internacian kolokvon por universitatanoj la 11an kaj 12an de novembro kun ĉeftemo: Esperanto – ponto inter lingvoj kaj kulturoj. UEA subtenas la partoprenon de du najbarlandaj instruistoj agantaj en trianivela edukado. La kolokvejo estos la Okcidenta Universitato de Timişoara.

Estas invitataj partopreni la kolokvon universitatanoj, esploristoj, studentoj, ĉu esperantistoj, ĉu uzantoj de la lingvo, per prelegoj el siaj fakoj. La laborlingvoj estos la rumana kaj Esperanto. La Scienca Komitato de la kolokvo estis jam komunikita en EKO 2016-17, sendita en la 4a de junio.

Universitatea de Vest din Timişoara

60 1956-2016

*Asociaţia de Esperanto din România*

## La celoj de la kolokvo:

1. starigi komunikponton inter esploristoj kaj universitatanoj el diversaj landoj pere de Esperanto
2. krei malfermiĝon de nia lando al la monda Esperanto-agado.

La organizantoj volas, ke la Okcidenta Universitato de Timişoara, kiu akceptis E-kurson por studentoj en 2015 unuafoje post la jaro 1985, kiam la reĝimo malpermesis la E-agadon en Rumanio. Ili volas komuniki al la publiko, ke Esperanto ekzistas, vivas, ke E-eventoj ja okazas en la mondo.

## Flugoj al Timisoara

Ne ĉiu scias, ke Timisoara, la tria urbo de Rumanio, havas internacian flughavenon, uzatan ĉefe de bonprezaj flugkompanioj.  Jen informoj por septembro; pri novembro, mem kontrolu!

http://www.flightstats.com/go/FlightStatus/flightStatusByAirport.do?airport=TSR&airportQueryType=1

Belgio (Bruselo-Charleroi WIZZ), Britio (London Luton WIZZ, London Stanstead RYN), Germanio (Berlin RYN, Düsseldorf RYN, Memmingen WIZZ, (Munkeno Lufthansa  kaj aliancoj – 3 flugoj tage), Hispanio (Barcelona, Madrid WIZZ), Italio (Milano WIZZ), Pollando (Varsovio), Rumanio (Bukareŝto 4 flugoj tage Tarom). Informoj pri la urbo: https://eo.wikipedia.org/wiki/Timi%C8%99oara

## La 49a Konferenco de ILEI

Spektu kvin-minutan filmon el bildoj faritaj dum la lasta konferenco de ILEI. Lasta en du sencoj: la plej freŝe okazinta, ankaŭ la lasta en la serio. Ekde la 50a, la aranĝo nomiĝos 'Kongreso'.

https://www.youtube.com/watch?v=ocVpu9RmzZk

## La 50a Kongreso de ILEI

ILEI kore invitas ĉiun kun intereso pri edukado partopreni en ĝia jubilea kongreso. Ĝi okazos ĝuste antaŭ la 102a Universala Kongreso en la suda parto de Koreio en la urbo Busano. Informoj pri la urbo:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Pusano

Informoj pri la kongreso:www.ilei.info kaj en Facebook:

https://www.facebook.com/groups/158807324552503/?fref=ts

## La 6a Afrika Kongreso de Esperanto

Ĝi okazos en Bunda en la orienta parto de Tanzanio, apud la nacia parko Serengeti kaj la Lago Viktorio. Ĝis la 5-a de septembro 2016 estas aliĝintaj al la kongreso 28 personoj el 13 landoj. Tiuj landoj estas Benino, Burundo, DR Kongo, Francio, Kanado, Kenjo, Madagaskaro, Senegalo, Svedio, Svislando, Sudafriko, Tanzanio kaj Togolando. Pliaj aliĝoj bonvenaj.




Ekzistas la eblo aliĝi subtene kaj ricevi retajn informojn pri la aranĝo. UEA laboras por helpi al afrikanoj en Tanzanio kaj apudaj landoj partopreni la eventon.

La 5a AKE okazis antaŭ tri jaroj; antaŭvidata estas okazigi tiujn kontinentajn kongresojn por Afriko ĉiun trian jaron.

Pardonu la anglalingvan mapon, sed mallongas la vivo.

Pliajn informojn oni trovas per: http://www.esperanto-afriko.org/ake6en2016.htm

## Konata lernilo en via mano

Ambaŭ volumoj de la telefona aplikaĵo “Esperanto per rekta metodo” nun estas pretaj kaj elŝuteblaj en la Google-apobutiko. Ambaŭ estas taŭgaj por *Android*-poŝtelefonoj kaj ankaŭ por *Android*-tabledoj. Sur tabled-ekranoj la bildoj kaj butonoj aŭtomate pligrandiĝas.

Informoj pri la kurso estas en la retpaĝo de Internacia Esperanto-Instituto en Hago, Nederlando: http://www.iei.nl/ieieo77.htm

Por elŝuti kaj instali la volumon 1: iru per via poŝtelefono al la Google-apo-butiko (Google Play) kaj trovu ĝin per la serĉvorto Esperanto aŭ Esperantokurso aŭ, per www.iei.nl/apo.htm (la butik-anonco kun pliaj informoj).

Por elŝuti kaj instali la volumon 2: iru per via poŝtelefono al la Google-apo-butiko (Google Play) kaj trovu ĝin per la serĉvorto Esperantoplus aŭ per www.iei.nl/apoplus.htm

Ni petas informi pri tio vialandajn esperantistojn, sed precipe ne-esperantistojn.

Vidu ankaŭ: https://play.google.com/store/apps/details?id=com.embarcadero.esperanto

Mesaĝo de Stano Marček

Vortoj: 580

# Kvar eventoj kaj lernilo



Frivola komuniko-ferma kvizo:

kio estas la ligo inter la titolo kaj la bildo?

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupo aŭ kialo por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

PDF farita de Nuance Power PDF